Ĉu Vi estas kontenta kun la kvalito kaj la amplekso de

**SCIENCA REVUO**

unika internacia scienca kaj popularscienca gazeto?

**Se jes**

**Rekomendu ĝin ĉie al Viaj amikoj kaj al bibliotekoj**

**Se Vi ne estas kontenta kun la kvalito**

**Helpu ke ĝi pliboniĝu — sendu aŭ instigu aliajn sendi pli bonajn artikolojn; la kritikojn, dezirojn kaj sugestojn direktu al la ĉefredaktoro**

**Se Vi ne estas kontenta kun la amplekso**

Varbu novajn abonantojn

**Ĉiuj novaj 5 abonantoj — unu paĝo pli en la jarvolumo!**

Jarabono 30 steloj = 2,2 usonaj dolaroj

La abonojn kolektas la delegita reto de

**Internacia Scienca Asocio Esperantista**

(Listo de la delegitoj sur la lasta kovrilpaĝo de la revuo)

**Malnovaj volumoj** (ekde Vol. 13) haveblaj laŭ la jarabona prezo.

Sekretariejo de I. S. A. E. ĉe **Prof. Dr. B. Popović Teknika fakultato, NIŠ, Jugoslavio**



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

327.39 (-11) (-15)) : 159.922 + 301.15

## PSIKOLOGIA RIGARDO AL LA KONFLIKTO INTER ORIENTO KAJ OKCIDENTO*

**(Wilfried Daim, Vieno, Aŭstrio)**

**La familio kiel modelo de la socio (1)**

Antaŭ kelkaj jaroj Nikita Hruŝĉov deklaris i. a. jenon:

»Al la imperialistoj ne plaĉas, ke la socialistaj landoj kreskas kaj evoluas. Ili volas limigi nin, instrui nin kiel infanojn, kiamaniere la vivado surtere estus por ni pli bona. La imperialistoj ja rigardas la sovjetan potencen kiel nelegitiman infanon. Ili simple ne povas kontentiĝi pri tio, ke ni nun tiom kreskis, ke ni ne nur povas lerni, sed ankaŭ multon instrui al aliaj. Jen same ekzistas, kiel vi vidas, kontrastoj inter la malnovaĵo kaj la novaĵo. Kompreneble ni ne povas kaj ne volas vivi laŭ la deziro de imperialistoj. Kaj ili estas malkontentaj kaj minacas al ni, ke ili traktos nin per vergo. Sed se ili traktos nin per vergo, ni hontigos ilin per tuta balailo.« (2)

*) Referato laŭ komisio de la Eŭropa Konsilantaro, farita ĉe seminario de la aŭstria Federacia Ministerio por Instruado.

**Noto de la redaktoro:** Kvankam la referato pritraktis aktualan politikan temon, oni pritraktis ĝin politike neŭtrale, sufiĉe science (de aparta starpunkto psikologia). Pro tio mi opinias ke ĝi estas konvena por niaj legantoj, kiuj ankaŭ legu ĝin senpartie, observonte ĉion de la sama starpunkto desur kiu la aŭtoro pritraktis la temon.

Tiuj tiom interesegaj frazoj evoluigas bildojn pri t. n. okcidento kaj pri t. n. oriento, kiuj devus postuli nian principan intereson. Ili jā ebligas al ni profundan enrigardon en la komuniste-sovjetan afekciecon. Tian enrigardon oni eĉ ne povas atingi per plejeble detala studado pri la diamato — aŭ almenaŭ povas atingi ĝin nur kun akcepto de multe pli grandaj malfacilaĵoj. Kiel fota fulmlumo dum momento heligas la malhelon kaj tiel faras ĝin fiksebla, tiel la ĵus cititaj frazoj ebligas al ni enrigardon en la »suban konstruaĵon« de la »oriento«, en la pli profundan risortosistemon, en kiu batas la koro de Moskvo.

Kiel kutime la citaĵo komenciĝas polemike: En la okcidento sidas »imperialistoj«, en la oriento la »socialstaj landoj«. Sed la sinteno atribuata al la »imperialistoj« kontraŭ la socialistaj landoj« sendube jam gvidas nin trans la propagandan polemikon kaj montras certan sentostaton. Ĉar laŭ tio »al la imperialistoj ne plaĉas, ke la socialistaj landoj **kreskas** kaj **evoluas.«** Estas certe, Hruŝĉov jen diras ion tre veran. Ĉar tio efektive ne plaĉas al la okcidento. Laŭ la deziro de »imperialistoj« la socialistaj landoj ne kresku kaj »ne evoluu«, do restu mizeraj, malabundaj, ekipitaj kun neevoluinta ekonomio.

Sed tuj ni sciiĝas pli pri la karaktero de la konduto de »imperialistoj«. »Ili volas **limigi** nin, **instrui nin kiel infanojn,** kiamainere la vivado surtere estus por ni pli bona.« Per tio eldiriĝis, post la ĝisnunaj aludoj, la unua palpebla, profundpsikologia, psikoanaliza karakterizvorto, la vorto »infanoj«. Laŭ la vortoj de Hruŝĉov la »imperialistoj« volas limigi la »socialistajn landojn«, do forpreni de ili la liberecon al moviĝo kaj evoluo. Plue ili volas, kiel malbonaj pedagogoj, la »socialistajn landojn« »instrui kiel infanojn«. Do la imperialistoj rigardas sin kiel »grandulojn«, kiuj instruu al la »socialistaj infanoj«, kiamaniere ili kondutu, kiamaniere »la vivado surtere estus pli bona« por ili, kiuj elektis propran vivmanieron. Oni do riproĉas al imperialistoj ne nur, ke ili volas malhelpi la sovjetanojn ĉe la kreskado kaj moviĝado, sed ke ili ankaŭ volas »instrui« kun aroganta plibonsciado, kiamaniere ili vivu laŭ imperialista maniero. Ili opinias la »socialistajn landojn« infanoj. Kaj tiu eksterordinare grava komparo tuj estas daŭrigata:

»La imperialistoj ja rigardas *la sovjetan potencon kiel nelegitiman infanon.*«

### »Infano« de la kapitalismo

Certe neniu serioze volas nei, ke la komunismo estas »infano« de la kapitalismo. Sed laŭ Hruŝĉov kaj li ja riproĉas tion al la okcidento — la kapitalistoj rigardas ĝin kiel nelegitiman, volas nenion scii



pri ĝi, kvazaŭ forpuŝas ĝin. Sed, se Hruŝĉov riproĉas al la okcidento, ke ĝi rigardas la sovjetan potencon kiel nelegitiman, ĉu tio ne signifas, ke li per tio postulas de ĝi, ke ĝi legitimigu la infanon, ke ĝi estonte agnosku ĝin kiel legitiman infanon? Do la latenta, neelparolita konflikto temas pri la legitimeco de la komunista infano en la homara familio.

Hruŝĉov daŭrigas: »Ili simple ne povas kontentiĝi pri tio, ke ni *nun tiom kreskis*, ke ni ne nur povas lerni, sed ankaŭ multon instrui al aliaj.«

Tio nun evidente celas la usonanojn, kiuj en la tempo de la parolado de Hruŝĉov ankoraŭ neniel estis superintaj sian raketotraŭmon. (3) La kapitalistoj do kontentiĝu pri tio, ke la proleta infano jam tiom kreskis kaj jam tiom lernis de ili, ke ĝi jam kapablas instrui ion al la patro. Ke tio efektive estas malfacila por la kapitalistaj patroj, mi certe ne bezonas detale pruvi ĉi tie. Al tio konvenas jeno:

»Jen same ekzistas, kiel vi vidas, kontrastoj inter la *malnovaĵo* kaj la *novaĵo*.«

Estas nenecese klarigi pli precize, ĉar estas memkompreneble en tiu interdependo, ke la »malnovaĵo« signifas la kapitalistan »imperialismon«, la »novaĵo« la proletan infanon. La venontaj frazoj nun montras, ke la komunista infano ne intencas lasi sin instrui pri sia vivoformo kaj iri tiun vojon, kiun volas preskribi al ĝi la kapitalista patro:

»Kompreneble ni ne povas kaj ne volas vivi laŭ la deziro de imperialistoj.«

Kaj la imperialistoj similas al malbonaj patroj, kiuj enmondigas infanojn sen voli agnoski ilin poste, kaj, laŭ Hruŝĉov, ilin eĉ minacas per perfortaĵoj kiel pedagogoj de la patriarĥeca feŭdalepoko: »Kaj«, li daŭrigas, »ili estas malkontentaj kaj minacas al ni, ke ili **traktos nin per vergo.«**

Sed la tempo, kiam la malgranda infano devas toleri tion, estas pasinta: »Sed se ili traktos nin per vergo, ni hontigos ilin per tuta balailo.« Oni vidas, ke la proleta filo ne plu estas infano, kiel en la unua tempo de sia neplenaĝeco. Li fariĝis granda kaj forta. Tiuj, kiuj ne havas sperton en psikoanaliza pensado, eble ĝeniĝos pro la vorto »filo« kaj kulpigos min pro sistemdevigo, ĉar ĝis nun Hruŝĉov ja parolis nur pri »infano«. Sed kompletiga citaĵo sendubigas la klarigon. Tiel Hruŝĉov diris je alia okazo:

## Komunismo en »viraj pantalonoj«

»Strangaj homoj (denove estas celataj la kapitalistaj imperialistoj) — oni povus kredi, ke ili... ankoraŭ nun rigardas la Sovjet-Union kiel tiun ŝtaton de la unuaj jaroj de la sovjeta potenco. Sed ni jam antaŭ longe ŝanĝis la infanpantalonetojn kun viraj pantalonaj.« (4)

Denove la riproĉo: Vi kapitalistoj ankoraŭ nun opinias nin beboj, kvankam ni jam preskaŭ (?) estas plenkreskaj. La ŝigno de la plenkreskeco estas la viraj pantalonoj, simbolo de la memdestina suvereneco, dum la infanpantalonetoj jam delonge estas demetitaj. La formuligo »viraj pantalonoj« do certe estas indiko pri tio, ke la aŭtostereotipo de Hruŝĉov pri la »oriento« havas la karakteron de vira junulo.

Ni resumu, kion instruis al ni la ĝisnunaj du citaĵoj pri la simbolaj trajtoj, kiuj regas la afekciecon de la sovjetanoj: La okcidentaj kapitalistaj imperialistoj kondutas kiel patro, kiu rifuzas la legitimecagnoskon al infano de li generita, kiu plue volas premegi ĝin en preskribitan vivovojon kaj kiu fine rifuzas, ekkoni ĝian relativan plenkreskecon. Sed vere la proleta filo estas jam multe pli granda, pli inteligenta kaj pli forta, ol la kapitalista patro pretas ekvidi.

Aliaj citaĵoj helpu al ni, ankoraŭ pli kolore pentri tiun bildon pri la t. n. konflikto inter oriento kaj okcidento. En sia en multaj rilatoj tiom interesega parolado antaŭ la aŭstria-sovjeta societo en Vieno, 1960, Hruŝĉov deklaris i. a.:

»En certa grado oni povas kompari nian vivon kaj nian kunekzistadon kun la konata biblia legendo pri la arkeo de Noaĥo... laŭ tiu biblia legendo Noaĥo konstruis sian arkeon kaj prenis sur tiun arkeon sep parojn da puruloj kaj sep parojn da malpuruloj.« (5)

## La »malpuruloj« kaj la »puruloj«

En la germana kaj certe ankaŭ en aliaj lingvoj ekzistas la parolturno »ni sidas en la sama boato«. Enfunde pensas Hruŝĉov pri la sama afero, menciante la biblian legendon pri la arkeo de Noaĥo. Oriento kaj okcidento sidas en la sama boato — la tero — kaj ili povas perei kune, se ili ne interharmonias. Kiom ĝusta estas tiu konstato, ĝi tamen neniel elĉerpas la signifon de la citaĵo. Noaĥo prenis en sian arkeon purajn kaj malpurajn bestojn. Kaj se Hruŝĉov komparas la du



»mondtendarojn« kun tiuj bestoj, nun ja tuj aperas la demando: »Kiuj estas la kapitalistoj kaj kiuj la proletarioj?« En pli posta parolado li diris, ke la komunismo forbalaos de la tero la malpuraĵon de la kapitalismo. Laŭ tio la kapitalistoj estas la malpuruloj kaj la komunistoj la puruloj.

Kaj malgraŭ la teorie ne planitaj streĉecoj inter la sovjetaj kaj la ĉinaj komunistoj, facile klarigeblaj el la disŝoviĝo de la fazoj en la revolucia evoluo, citaĵo de Mao Ce-tung jen povus doni eksplikon: Li diris:

»La plej puraj homoj surtere estas la laboristoj kaj kampuloj. Kvankam iliaj manoj estas malpurigitaj kaj iliaj piedoj estas ŝmiritaj per bovina sterko, ili tamen estas pli puraj ol la burĝaro.« (6)

Mao jen enkondukas duoblan signifon de pura kaj malpura. Laŭ senco primitiva, origina tiel la proletarioj estas malpuraj, sed laŭ senco sublimigita — kiun konas en parenca maniero ja ankaŭ la kristanismo — la burĝaro estas malpura. Sed per tio ni riĉigis la konfliktbildon je tre esenca trajto, kiu ludas tiom gravan kaj samtempe neatentatan rolon en la socio. Estas la kontrasto inter pura kaj malpura. Malpura laŭ primitiva senco estas la »malpura proletaĉo«. Sed la pariaso defendas sin kaj nun deklaras la kapitaliston malpura. Estas ja antentinde, ke ankaŭ la infano ĉiam ree estas admonata esti pura. Al la malpura infano kontraŭstaras la pura patro.

## Familia konflikto

La imago de Hruŝĉov pri la konflikto inter oriento kaj okcidento estas tiu de familia konflikto inter patro kaj filo. Ĝi montras la filokomplekson de la patroj (G. H. Graber) (7), kiuj unue mem posedas ĉiujn ecojn kaj valorojn superajn kompare al la malgrandaj infanoj, escepte tamen de unu decide gravega: La evolua potenco de la infanoj estas pli granda. Dum la patro fariĝas pli maljuna, la infano pligrandiĝas kaj pliinteligentiĝas. Kaj estas la mizero de ĉiuj duonkreskuloj, ke ili malgraŭ ĉia tiom demonstrative prezentita memkonscio tamen sopiras agnoskon kaj komprenon de la patroj.

Se tiel do la prezentaĵo de Hruŝĉov konformas al la generacia konflikto en familio inter patro kaj filo, ni nun venas per tio al la centra eniro en la kernon de nia temo. Ĉar la analogio uzita de Hruŝĉov ne estas hazarde elektita, primitiva komparo. Kontraŭe, ĝi tuŝas tre profundan problemon, nome la fundamentan signifon de la prafamilia konstelacio, kia ĝin montris Sigmund Freud en tiom dankinda maniero. Kvankam li — tiun eraron poste rebonigis la sviso Gustav Graber — nereflektite transprenis la patriarĥecan kolektivmentalitaton kaj tial rigardis la tutan familian konstelacion tro unuflankece el la valorvidpunkto de la patro — li jes malkovris la patrokomplekson de la filoj, sed ne la filokomplekson de la patroj — tamen li trovis ŝlosilon, kiu malfermis la aliron en ĉambron de afekcia dinamiko.

Kiel facile estas do per la ŝlosilo de Freud, montri ekz. la samtempan agresemon kaj sinidentigon de proletaj filoj kun la kapitalistaj patroj. Enfunde la komunistoj de Ruslando ja nenion deziras tiom, ol krei duan Amerikon.

Ĉe tio la infanecaj, en la familio tumultantaj afekcioj uzas por sia transponiĝo en la socion la analogajn sociajn rilatojn kiel rimedon por la sublimiĝo. Ĉar la homaj afekcioj havas econ, ke ili estas transmeteblaj de originaj objektoj al analogaj situacioj. Tiel transmetiĝas originaj afekcioj, kiuj evoluas en kadro de la familio, al **analogaj konstelacioj** kaj tie disvolviĝas en pozitiva aŭ negativa formo. Kondiĉo por tio estas kompreneble analoga strukturo de socio. En la kazo de konflikta konstelacio kapitalisto-proletario estas la kapitalisto, kiu tiel posedas multajn el ecoj de la patro. Li estas pura, li rajtas ordoni, li havas posedaĵon, li estas pli libera ktp. Kaj la strangecoj de afekcia sistemo rezultigas, ke eĉ usona meti-lernanto havas ankoraŭ »kapitalistan«, sovjeta milionulo »proletan« karakteron.

Kaj kion pri la patrino? Tiel oni povus demandi, ĉar ni atingis la kampon de afekcieco en la familia konstelacio. Kiel vi scias, Freud malkovris la de li t. n. edipan komplekson. En tiu konstelacio ekzistas agreso de filo kontraŭ la patro, ĉe kio la objekto de la latenta batalo estas la patrino. (Ĉe knabino la batala konstelacio estas pli komplikita). La kompletigo de tiu konstelacio, la filokomplekso de patroj, montras eblecon de la agreso de la patro malsupren, ĉar li timas potencon de la filo. La konsekvenco de tiu agreso estas limiga subpremo, neagnosko de memdestino kaj personeco de la filo.

### »Privirina batalo« — ĉu motivo de la mondpolitiko?

Jen en la familio estas modelo de ĉiu sovaĝa pasio en la privirina batalo. Ne estus malfacile, pruvi tiun motivon ankaŭ en la konflikto inter oriento kaj okcidento rilate al sublimigitaj anstataŭaj



objektoj. Temas pri la tero, per raketa vetkuro pri la luno, kiu preskaŭ ĉie estas sentata ina, kaj malantaŭe jam aperas Venuso kiel nova batalobjekto.

> Sed mi opinias, ke estas pli favore, montri nun per aliaj ekzemploj, kiamaniere tiu familia prakonstelacio efikadas alirilate.

En unu el la plej brilaj propagandaj teatraĵoj de la mondliteraturo, en la kontraŭfeŭdala kaj porburĝa ludo »La edziĝo de Figaro«, Beaumarchais formis en la figuro de grafo patrotipon kaj en la burĝa Figaro la tipon de la suprenstrebanta sed subpremita filo. La fajlitan, bone cenzuritan libreton kompletigis Wolfgang Amadeus Mozart per sia arte eleganta, ĉirkaŭludite eksplodiga muziko. La aristrokrato deziras posedi la fianĉinon de Figaro, sed estas venkata de la fleksebla intelekto de la burĝo same kiel de la moviĝeco de virinoj, kiuj jam estas sur la flanko de la burĝo kaj ne de la aristokrato. (8)

Tiu teatraĵo, kiu direktas sian pinton kontraŭ la suprulo, kontraŭ la patrotipo, celas la filokomplekson de la patroj, same kiel faras ankaŭ la atakoj de Hruŝĉov. Tio estas tipa por revoluciaj suprenstrebantoj.

La sola teatraĵo, kiu laŭ la impeto de sia efiko estas komparebla kun tiu de Beaumarchais (Danton diris: »Figaro mortigis la aristokration«), estas la teatraĵo »La blankhara virino« de Mao Ce-tung. Ĝi ludis en la ĉina intercivitana milito similan rolon kiel »La edziĝo de Figaro« en la Franca Revolucio. La ludo de Mao havas ankaŭ tute analogan enhavon. Sed ĉi tie mi ne volas trakti ĝin pli precize. Tion mi faris detale en alia loko. (9)

Dum en la revolucia literaturo la uzurpinto, la patro regata de sia filokomplekso, estas objekto de la agreso, do en la konservativa aŭ eĉ reakcia literaturo ĝi estas filo regata de sia patrokomplekso, kiu ŝtelas edzinon de la legitimaj posedantoj. La malpura, vulgara kaj malnobla subkastulo levas sian manon kontraŭ sia mastro, li prenas lian edzinon kaj perfortas ŝin, aŭ ŝi mem, kvazaŭ nelojale, »forjetas sin« al la malsuprulo.

Dum Mao Ce-tung ie kontentigite konstatas, ke dum kampula ribelo en la jaro 1927 »la malpuraj piedoj de la kampuloj paŝegis trans la eburajn litojn de la bienestridinoj«, (10) tiel kelkajn konservativajn aŭ eĉ reakciajn tipojn incitas ĝis kolerego jam la fakto, ke viro venanta de malsupre **edzinigas** superkastan virinon.

Ni scias pri linĉkastradoj al nigruloj en Usono, kiuj havis sekskontakton kun blankaj virinoj. En Grand-Britujo, kiu estas ekipita kun tiom granda demokrata tradicio, oni murdis kolorhaŭtulon, kiu havis rilatojn al blanka junulino.

La kastraddeziroj kontraŭ tiuj, kiujn oni konsideras malsupruloj, fariĝis rekte konsciaj ĉe la NS-pornografo Julius Streicher, kiu ja postulis en sia gazeto »Der Stürmer« (La sturmanto) en la devizlinioj la kastradon de la t. n. rasmalhonorigantoj. (11)

Ni klarigu al ni pli detale, kian rolon ludis ekz. en la duagrad-feŭdala, rasideologia naziismo la batalo pri la posedo de la patrino. Kun tio estas ja ligitaj la plej mallumaj faroj de la t. n. civilizita homaro. Cetere oni povas speciale demonstri ĉe ili la elirpunkton de ĉi tiu referato, nome ke la familia prakonstelacio estas ankaŭ la prabatalkampo de la homaro.

### Alvoko al la praafekcioj

Dum en la revolucia literaturo la alvoko al la praafekcioj okazas plej ofte vualite aŭ sublimigite, ni trovas en la plej malhela elemento de la faŝismo, en la naziismo »la apelacion al la interna kanajlo« (12) kiel ĝin nomis Kurt Schuhmacher, deklarita kun malkaŝo, kiu neniel ŝparas brutalecon.

Se ni volas esplori ideologion pri ĝia afekcia »suba konstruaĵo«, ni devas procedi metode — la metodon mi ja ĵus demonstris ĉe la komunismo — laŭ jena maniero: Unue oni ekzamenu la ideologian konfliktkonstelacion. Plue oni provu laŭeble komplete ekkoni diversajn trajtojn de la pozitiva kiel ankaŭ de la negativa konfliktanto.

En naziismo la pozitive karakterizita parto de la konfliktparo estas la t. n. »norda homo«, la negative karakterizita »juda subhomo«. Laŭ tiu fantazie realfremda »ideologio« finfine okazas ĉefa batalo de la mondhistorio inter laŭdire sole kreipova (psikoanalize rigardite »generipova«) norda homo kaj laŭdire kulturdetrua judo. (13)

La norda nobelulo kreis kaj generis ĉiujn valorojn, de li devenas ĉiu kulturo (kio donis okazon por la plej kuriozaj historiaj mistifikoj), de li devenas ĉiu »konstrua« ordo. Inverse la judo, perfide rampante kaj de sube, malkonstruas ĉion nobelan kaj noblan, li estas vermo mordetanta radikojn de la mondfrakseno. Li estas »malpura«, »naŭza« en primitiva kaj en sublimigita sencoj. (14) Sed sian plej malbonan demonecon li disvolvas same brutala kiel malice ruza virinrabanto.

La arja herohomo sentas sin minacata en sia virinposedo de la suprenstrebanta judo. Jen montriĝas do unuagrade la filokomplekso de patroj, kiuj — same kiel blankaj sudŝtatanoj, OAS-francoj, buraj sudafrikanoj ktp. — timante defendas sian socian pozicion kontraŭ la desube suprenstrebantaj subkastuloj, kiuj estas ekipitaj kun pli alta evolua potenco. En la kazo de naziismo tio ankaŭ fakte estas ĝusta por grandaj partoj de la t. n. »inteligentularo«, kiu estas post



trenata laŭ ĝia vojo. Same tio estas ĝusta por amaso de malgrandburĝoj kaj de oficiroj kaj subofciroj el la unua mondmilito kun ilia rompita memkonscio, kiuj en la Weimar-a Respubliko estis metitaj ad acta kaj formis la batistokadrojn de la subhomeco organizita en SA kaj SS. Sed malantaŭ, pli bone dirite sub tiu afekcieco malsupren troviĝas ankoraŭ pli profunda kaj histoire multe pli malnova tavolo de kontraŭjuda malamo, kiu montras precize la inversan bildon.

Ĉar rilata al la ideo de la »elektita popolo« la historia antaŭeco apartenas tutklare al la judaismo antaŭ la germannaciismo. Tiu ideo, ĝuste komprenite laŭ religia senco, estas ja nenio alia ol elektiteco ja speciala atestanteco por Dio, tiu tamen ankaŭ ĉe la judoj dumetempe gvidis al naciista nazismo. Jen la judaismo estas tutklara modelo por naziismo. »Am deutschen Wesen soll die Welt genesen!« (La germana naturo kuracos la mondon!) Ĉu en tiu infaneca naiveco kaj arganteco ne esprimiĝas la sopiro je tiu patre-modela pozicio de judoj? En tiu ĉi konstelacio la judo estas supre, li estas patro, al kiu oni volas rabi lian pozicion, por esti tio, kio li estas.

Sed jen aldoniĝas ankoraŭ alia profunde tragika elemento, profunde tragika, se oni mem konfesas la kristanismom.

Estas ja apenaŭ pridubeble, ke sen tiu jarcentaĝa kristan-juda konfliktkonstelacio, en kiu la kristanaro — kiel konate Streicher defendis sin per Luther-citaĵoj — ŝarĝiĝis per enorma, amara kulpo, la nazia ekseceso en la koro de Eŭropo ne estus estinta ebla. Kaj tiom pli ne estus estinta ebla la grandparte malforta, ofte eĉ malkuraĝa reakcio de la kristana amaso kontraŭ la judo-ekzekutadoj. Kaj kion ni diru pri tiu konflikto?

Longe antaŭ la eldiro de Hruŝĉov pri la nelegitima infaneco de komunismo mi iam diris al juda amiko: »La judoj havas similan rilaton al kristanismo kiel patro, kiu ne volas agnoski kiel legitiman sian plej bonan infanon.« Iam poste judo diris al mi, kun inversa antaŭsigno: »Kristanismo atendas sian agnoskon de judoj«.

Jen la judo estas patro, la senkompare pli maljuna patro, kiu rifuzas al kristanismo la agnoskon de ĝia legitima origino, sed samtempe estas ofte ankaŭ plej profunde iritita de ĝi. Inverse en kristanismo, por la nuna ekzisto de judoj, ardetas sento de malsupereco, sopiro je konfirmo, kaŭzante tiun jarcentaĝan malamon, kiu estas viva en ĝi kaj raciiĝas, justigas sin pro la morto de Kristo.

Kaj tial do apartenas ankaŭ al la baza ideo de kristanismo, ke je la fino de tempo la judoj konvertiĝos, t. s. ke ili ne plu rifuzos al kristanismo la agnoskon de ĝia legitimeco. Sen tiu agnosko kristanismo de evidente ne estas perfektigita.

Ni povas vidi — mi esperas ke mi prezentis tion kompreneble kaj imprese —, ke la streĉeco inter patro kaj filo en la familia konstelacio formas la prabazan koncentriĝon de la individua sfero, sed ankaŭ, post la transponiĝo de tiu konflikta afekcieco en la socion, de la kolektiva sfero.

Kiom ege malfacile estas, repacigi patron kaj filon eĉ nur en iu speciala kazo, se oni konsideras homojn per la metoda skalpelo de psikoanalizo.

Tia referato nur povas gvidi sondilon de la ekstreme diferencigitaj kondiĉoj en la socio al principaj rilatoj de la infaneco interne de familio. Multo, kio estus grava, restis maldekstre kaj dekstre de la sondilo. Eĉ tiom gravaj aferoj kiel problemo de la frateco. Kaj fine ankaŭ rolo de la patrino estis tro pasiva, tro unuflankece de la flanko de viro. Kaj multo alia. Mi devas inviti vin, legi pluron el tio, kion mi skribis pri la temo, kvankam ankaŭ tie ankoraŭ multo ne estas elĉerpita.

Se vi faros tion, mi povus logi vin al kampo, kiu eble estas interesa por vi. Aŭ eble mi povis malfermi pordon, eĉ se tiu ĉi gvidas nur al la kompreno de tiu frazo, kun kiu mi deziras fini:

Ĝi ampleksas konfliktojn en la familio kaj en la socio inkluzive de tiuj inter judaismo kaj kristanismo, ja eĉ de tiu inter »oriento« kaj »okcidento«. Ĝi estas kvazaŭ lasta donaco de la Malnova Testamento, je kies fino ĝi troviĝas. Ĝi estas plena de tiu kondiĉa apokalipseco, kiu preskaŭ ĉiam karakterizas veran profetecon. De tiu apokalipseco, kiu ek de la modernaj armiloj estas donita en niajn proprajn manojn: (15).

»Jen mi sendas al vi Eliason, mian profeton. Ankoraŭ antaŭ ol alvenos mia tago, la granda, terura.
Li repacigas kun la **filoj la patrojn.**
Kun la patroj la filojn.
Por ke mi ne devos veni.
por malbene anatemi la landon.« (16).



**Notoj:**

(1) La baza materialo de tiu ĉi parolado estas detale prezentita en: Wilfred Daim: »Der Mann, der Hitler die Ideen gab« (La viro, kiu liveris al Hitler la ideojn), Isar Verlag, München, 1958; »Die kastenlose Gesellschaft« (la senkasta socio), Manz-Verlag, München, 1960; »Strategie des Friedens. Ein neutralistisches Konzept« (Strategio de la paco. Neŭtralisma koncepto), Europa-Verlag, Wien, 1962.

(2) Fina parolado de N. S. Hruŝĉov ĉe la XXII-a partikunveno de la KPdSU la 27-an okt. 1961. Citita laŭ la aldono al »Sowjetunion heute« (Nuntempa Sovjet-Unio), n-ro 45 de la 5-a ne nov. 1961, paĝo 4.

(3) Komparu mian verkaĵon: »Zur Psychoanalyse des Raketenwettlaufes zwischen Ost und West« (Pri la psikoanalizo de la raketa vetkuro inter oriento kaj okcidento) en »Der Psychologe« (La psikolgo), Bern, I./II. 1961. Ĝi aperis ankaŭ en japana traduko. La verkaĵo plejgrandparte absorbiĝis en »Die kastenlose Gesellschaft« (La senkasta socio).

(4) Parolado de N. S. Hruŝĉov ĉe la V-a mondsindikata kongreso la 9-n de dec. 1961. Citita laŭ la aldono al »Sawjetunion heute« (Nuntempa Sovjet-Unio), n-ro 51 de la 17-a de dec. 1961, paĝo 5.

(5) Parolado de N. S. Hruŝĉov ĉe la demonstracio de la aŭstria-sovjeta societo la 2-an jul. 1960. Citita laŭ la aldono al »Sowjetunion heute« (Nuntempa Savjet-Unio), n-ro 28 de la 10-a de jul. 1960, paĝo 11. Pli precize, precipe rilate al la erarpenso en ĝi troviĝanta, tiu citaĵo estas analizita en »Die kastenlose Gesellschaft« (La senkasta socio).

(6) Mao Ce-tung, citita laŭ Robert Payne »Mao Tse-tung, eine Biographie« (Mao-Ce-tung, biografio), Hamburg 1950, paĝo 317. Komparu al tio mian traktaĵon, kiu grandparte estas enmetita en »Die kastenlose Gesellschaft« (La senkasta socio): »Zur Tiefenpsychologie der Revolutionsdynamik im chinesischen Kommunismus« (Pri la profundpsikologio de la revolucia dinamiko en la ĉina komunismo) en »Der Psychologe« (La psikologo), Bern, XII./2, kaj: »Der unvergeßliche Tag des Schi Tschuan-hsiang« (La neforgesebla tago de Ŝi Ĉuang-hsiang), en »Der Psychologe« (La psikologo), Bern XII./12.

(7) Gustav Hans Graber: »Psychologie des Mannes« (Psikologio de la viro), Bern, Stuttgart 1957.

(8) Komparu rim. 1.

(9) Komparu rim. 6

(10) Mao Ce-tung, citita laŭ Robert Payne: »Mao Tse-tung, ein biographie« (Mao Ce-tung, biografio), Hamburg, 1950, paĝo 125.

(11) Reproduktita en »Die kastenlose Gesellschaft« (La senkasta socio), aldono, tabulo 4.

(12) Citita laŭ Josef Hindeles: »Hitler war kein Zufall; ein Beitrag zur Sociologie der Nazibarbarei« (Hitler ne estis hazardo; kontribuo al la sociologio pri la nazia barbaraĵo), Europa-Verlag, Wien, 1962, paĝo 53.

(13) Komparu Wilfried Daim: »Der Mann, der Hitler die Ideen gab« (La viro, kiu liveris al Hitler la ideojn), Isar-Verlag, München, 1958.

(14) Komparu la reproduktaĵon de titolpaĝo de »Der Stürmer« (La sturmanto) en »Die kastenlose Gesellschaft« (La senkasta socio), aldono, tabulo 5.

(15) Wilfreid Daim: »Totaler Untergang?« (Ĉu universala pereo?), Manz-Verlag, München, 1959.

(16) Mal. 3, 23-24.

*(Laŭ represo en »Österreichische Monatshefte«, kajero 6/7, julio-aŭgusto 1962 paĝo 19 sekv. tradukita el germana lingvo de Klaus Perko)*



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

301.17+159.9:408.92

## DIREKTOJ DE PSIKOSOCIAJ ESPLOROJ PRI LA ESPERANTO-MOVADO*

(M. Dobrzyński, Varsovio, Pollando)

Disvolvo de la socia evento kiun oni nomas Esperanto-movado ne devas esti lasita al hazardaj fortoj. Kontraŭe, ĝi povas esti konscie kondukata. Sed por racie gvidi la movadon oni bezonas komplekson da gravaj kaj fidindaj informoj pri ĝi, kiuj estas atingeblaj pere de la plana scienca esplorado celanta:

Unue — malkvroon de faktoroj obstaklantaj disvolvon de la movado Ekkoninte ilin oni povas malgrandigi ilian influon.

Due — montro de faktoroj al disvolvo de la movado.

Nur post la ekkono de plej gravaj fortoj influantaj movadon oni povas jungi ilin al la servo favora por movadaj celoj.

Manko de koncernaj esploroj instigis min prikonsideri eblecojn krei bazon por komence enkonduka pristudo de la Esperanto-movado el psikosocia vidpunkto.

Tamen antaŭ ĉio ni interkonsentu pri kelkaj terminoj . . .

Kiam certaj bezonoj de iu socia grupo ne estas plenigataj, kreiĝas en ĝi stato de malkontento, kiun membroj de la grupo penas forigi. Se tiuj penoj transformiĝas en aran inklinon celanta realigi la komunan celon, tiam kreiĝas **socia movado**[1]). Pri ĝia karaktero decidas speco de problemoj, kiujn koncernas ĉitiu socia malkontento kaj ecoj de grupo kiun ĝi tuŝas. A. M. Rose[2]) diferencigas tri kategoriojn de sociaj movadoj:

**En reformemaj** movadoj malkontento tuŝas limigitan aron da homoj kaj ne koncernas iliajn fundamentajn bezonojn. Tiaspecaj movadoj laŭprincipe ne renkontiĝas kun perforta kontraŭago. Al tiu kategorio ni apartenigu esperantismon. Du aliaj estas revoluciaj kaj ekspresivaj (expressive) movadoj.

*Prelego, recivinta la unuan premion, dum la III Studenta internacia scienca seminaro en Toruń (Pollando), aprilo 1966.

[1]) Laŭ prelegoj de prof. Szczepański (Marĝene: septembre 1966 li estis elektita prezidanto de Monda Sociologia Asocio).

[2]) Sociology. New York 1956, p. 347 kaj aliaj.